


Eŭropa Bulteno

Decembro 2013, Numero 133

**PROSPERAN KAJ OPTIMISMAN JARON AL ĈIUJ
LEGANTOJ DEZIRAS
LA ESTRARO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO.**



Novjaraĵoj de EEU vi trovos sur la paĝo 4 de la Bulteno.


Estraro de EEU

ĜUU LA PLEJ BELAN EŬROPAN MARBORDON KAJ BONEGAN ESPERANTISTAN ETOSON

Venu al la 10-a jubilea kongreso de EEU en Rijeka, Kroatio, ĉe la Adriatika marbordo. Se vi venos aviadile vi alflugos al la proksima insulo Krk kiu estas kun la bordo ligita per granda ponto. En la Kvarnera Golfo en kies pinto situas la urbo troviĝas kelkaj belegaj karstaj insuloj kun pinarbaroj kaj multaj strandoj, kiujn vi povos viziti, okcidente komenciĝas tre specifa kaj naturdotita duoninsulo Istrio kaj norde belega sovaĝa arbarregiono kun montoj pli ol 1500-metraj.



La 4-taga antaŭkongreso kondukas vin al meza Adriatiko. Oni loĝos en urbeto Biograd kaj de tie vizitos plej belajn naturareojn de Kroatio: La lagojn de Plitvice, la insulojn Kornati kaj la akvofalojn de Krka. Kompreneble abundos banado kaj amuziĝo.



La kongreso mem estas serioze preparata. Ĝin aŭspicios kaj la urbestro kaj la reĝistro – eble eĉ ŝtato-prezidanto al kiu ni sendis leteron kun tiu ĉi peto. Kadre de la ĉeftemo prelegos tri esperantistaj fakuloj sed ankaŭ tri gravaj fakuloj de Kroatio: universitataj profesoroj Ivo Žanić, Jagoda Granić kaj la kroata parlamentano kaj universitata profesoro Milorad Pupovac. Ni havos abundan ĉiutagan kulturen programon, ekskursan tagon, plurajn duontagajn ekskursojn kaj aron da interesaj prelegoj, kunvenoj kaj konferencoj.



Rijeka vin atendas. Ne hezitu, aliĝu tuj por ŝpari monon. <http://eeu-kongreso.webnode.com//>

La Loka Kongresa Komitato

NOVJARA DONACO: RETA VERSIO DE LA LIBRO PRI EŬROPA E-MOVADO EN LA UNUAJ JAROJ DE LA 2010-AJ JAROJ



Post pli ol trijara laboro la redakcio de Eŭropa Bulteno sukcesis kolekti artikolojn pri la stato de E-movado en la nuntempo pri ĉiuj landaj E-movadoj en EU krom la kipro, kiu ĝuste en 2013



startis per la unua Esperanto-kurso en kipro lernejo. Do ni kunmetis 27 artikolojn kiuj reliefigas iom la historian fonon de ĉiu landa movado kaj ĉefe la nunan staton. Temas ne pri serioza scienca studo, sed pri artikolforma priskribo, sed la artikolojn skribis gravaj esperantistoj kiuj konas la veran staton. Eble kelkaj – tre malmultaj artikoloj – ne plene kontentigas la postulon – sed ni klopodos tion plibonigi, ĉar iam en 2014 ni planas eldoni ankaŭ paperforman plibonigitan version. Jen do novjara donaco de EEU al la eŭropa esperantistaro.



Nia celo estis havi unuloke ne tro ampleksan sed tamen realan prisskribon de la stato tiel ke tiu ĉi libro estu historia materialo kun kiu sin povos kompari la estontaj statoj kaj mi povas deklari, ke esence ĝi kontentigas tiun celon.



La libro estas libere legebla kaj elŝutebla sur la paĝaro de EEU :

<http://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=413&filename=europo-e-movado.pdf>



Ni estos kontentaj, se la legantoj sendos siajn opiniojn pri ĝi kaj proponojn pri eventualaj plibonigoj.

Ankaŭ Landajn Asociojn ni petas pripensi kaj respondi kiom da ekzempleroj de la paperforma libro ili pretus mendi por siaj landaj bezonoj. Baze de ilia reago ni scios kiom da ekzempleroj presi kaj

tio difinos la koston.

Zlatko Tišljár

LABORPLANO DE EEU POR 2014

Dum la estrarkunsido de EEU okazigita skajpe en decembro oni akceptis laborplanon de EEU por la jaro 2014. Jen ĝi en mallonga formo por ke la landaj asocioj povu sekvi la planon kaj mem kontribui al ties realigo.

1. Ellaboro de 2-3 novaj projektoj baze de konkursoj de Europa Komisiono kaj transdono al la koncernaj fondaĵoj inter kiuj por Citizenship kaj prilingvaj konkursoj en nova EU-programo komenciĝanta en 2014.
2. Kontaktado de instancoj en Slovakio kaj Pollando kun la iniciato organizi interregistaran konferencon pri „Kultura kaj lingva dimensio de EU“, eventuale en Viŝegradaj landoj

3. Organizo de la 10-a EEU-kongreso en Rijeka, Kroatio (6-12. Julio 2014)

4. Realigo de la dua parto de la eŭropa projekto „Lingvo.info“ laŭ la akceptita plano de la projekto (3 kunvenoj de partneroj, plua realigado de taskoj kaj kontrolo de progreso,



administrado kaj manaĝerado de la tuta projekto, financa kaj raportada ktp.

Aperigo de la reta paĝaro Lingvo.info.

5. Plua okupiĝado pri la popoliniciato ĉe la Eŭropa Komisiono kun propono akcepti tekston de komuna eŭropa himno, kiun EEU jam uzas en siaj eŭropaj aranĝoj, en neŭtrala lingvo Esperanto. Prezenti plendon al Eŭropa Ombutsmano. Prepari kampanjon pri eŭropa himno inter korusoj de Eŭropo

6. Pluaktivi en Platformo por multlingvismo de Eŭropa Komisiono kune kun E@I.

7. Eldoni libron paperman pri la stato de Esperanto-movado en Eŭropa Unio kiel kolekto de 28 artikoloj pri la movadoj en 28 EU-landoj, kiujn ni aperigis en Eŭropa Bulteno inter 2010 kaj 2013.

8. Organizo de podia diskuto kadre de Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) komence de septembro 2014 kaj aktiva partopreno en la Forumo kun aparta atento al informa agado.

9. Partopreno de EEU-representantoj en proksimume 10 diversaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn.

10. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en deko da konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU.

11. Disdono de letero-deklaro al membroj de Eŭropa Parlamento verŝajne kun jena enhavo:

- a) invito al EEU-kongreso kaj konferenco »Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj« en Kroatio
- b) informo pri la eŭropa agado en Pollando kie oni atendas akcepton far Pola Parlamento pri proklamo ke E estas kultura heredaĵo de Pollando.

12. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26-a de septembro): publikaj prelegoj pri lingva stato en Eŭropo, ekspozicioj pri Esperanto, lingvaj festival(et)oj, aperigo de nacilingvaj libroj – tradukoj al malpli grandaj lingvoj.

13. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj okaze de Tago de Gepatraj lingvoj (21-a de februaro): Disvastigo de konkludoj de Eŭropa Platformo de Civitanasocioj por Antaŭenigo de Multlingveco, per prelegoj kaj rondaj tabloj.

14. EEU-kunlaboro kun diversaj internaciaj kaj eŭropaj Esperanto-organizoj kiel UEA, TEJO, SAT, AVE, EDE, AEK, ILEI ktp.

15. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 12 paĝoj) en elektronika formo kaj aperigata en nia EEU-paĝaro kaj en la paĝaro gazetejo.org.



16. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU: www.europo.eu.

17. Organizo kaj preparo de Jarasembleo de EEU en Rijeka (Kroatio) dum la Kongreso kaj de du estrarkunvenoj (en Rijeka kaj en Bruselo).

18. Serĉi sponsorajn landajn asociojn por helpi al landaj asocioj en krizo, ĉefe por Kipra, malta kaj bulgara asocioj. Fortaj landaj asocioj kiuj transprenus sponsorecon super iu el la menciitaj movadoj, devus financi restadon de 2 gejunuloj el tiuj landoj en SES en Slovakio (Nitra, julio 2014).

19. Lanĉi kampanjon pri enkonduko de identa reta kurso por komencantoj laŭ la Zagreba metodo en laŭeble multaj paĝaroj de LAoj en EU.

La estraro de EEU

MORTIS SCIENCA GRANDULO KAJ PIONIRO DE EŬROPA E-AGADO

Prof. Helmar Frank 1933-2013

Mi havis feliĉon multe kunlabori kun prof. Frank ekde 1975 kiam li partoprenis en de mi organizita lingvistika simpozio en Kroatio (Kumrovec). Ĉar mi havis antaŭajn konojn de teknikaj sciencoj, mi decidis en komenco de naŭdekaj jaroj studi kibernetikon ĉe AIS



(Akademio de Sciencoj San Marino) sub la gvido de d-ro Frank kaj en 1996 mi ricevis titolon de magistro pri kibernetikaj sciencoj efektiveginte tri-jaran eksperimenton pri antaŭlernado de Esperanto cele al rapidigo de la posta lernado de la angla respektive germana lingvoj. Tio, laŭ mia scio estis la ununura eksperimento kiu estis efektivegita laŭ la preskriboj de la kibernetika pedagogio kaj kies rezultoj estis kalkulitaj laŭ la scienca metodo de Frank. Pri tio oni povas legi en: <http://miresperanto.com/biblioteko/tishljar/17.htm>

Prof. Frank havis enorman energion kaj grandiozajn ideojn kaj faris en la scienco grandajn paŝojn sur la kampo kiun tiutempe malmultaj prizorgis kaj nuntempe oni preskaŭ forgesis ke la tuta informadiko en kies ĉirkaŭbrako ni ĉiuj vivas estas nur parto de kibernetiko kaj ke la informadiko ne povus ekzisti sen teoria fono de kibernetiko. Tiusence lia signifo en la monda scienco nur povos kreski. Pli detale, kvankam eĉ ne proksime al la enorma biografio de Frank vidu sube malongigitan biografion skribitan de lia edzino prof. Vera Barandovska Frank. Alia aspekto de prof. Frank pri kiu oni ankaŭ nesufiĉe konscias estas lia pionireco rilate la poresperantan agadon en EU (tiam Eŭropa Komunaĵo: EK). Li fondis jam en sepdekaj jaroj Eŭropan Klubon el kiu daŭre naskiĝis novaj kaj novaj ideoj kaj iniciatoj kaj pri tio vidu ankaŭ sube apartan raporton. Unu el la rezultoj de la Eŭropa Klubo estis ankaŭ fondo de la Akademio de Sciencoj en San Marino, kiu estis kaj restis la ununura universitato kiun gvidas sciencistoj – esperantistoj kaj kiu uzas interalie ankaŭ Esperanton en la prelegado, eldona agado, ekzamenado kaj administrado.

Ni en EEU devas konsideri lin efektive la komencanto de nia nuna laboro. Socia kaj politika engaĝiĝo por antaŭenigi E-on en Eŭropa Unio. Prof. Helmar Frank estas sendube unu el la plej signifaj granduloj de la E-movado de la dudeka jarcento (laŭ mi apud Zamenhof, Lapenna, Sekelj kaj Tonkin).

Zlatko Tišljarić

ESPERANTO EN UNUHORA TV-ELSENDO EN GREKA TELEVIDO

Unu el plej interesaj, rimarkindaj kaj vaste popularaj elsendoj de la Greka Ŝtata Televizio estas la programo titolita “27 de Eŭropo”. Temas pri proksimume unuhora elsendo kiu prezentas la staton, la diversflankan ĝeneralan bildon de EU kaj pritraktas diversajn temojn rilate al la ĉiaspeca agado, planoj kaj atingoj en la kadro de la diversaj eŭropaj programoj. Ĝis nun estas prezentitaj multaj, vaste interesaj temoj, kiel pri la edukado, elmigrado, agrikulturo, fiŝkaptado, pri financaj problemoj, socialaj reformoj, socialema politiko kaj aliaj. Temo de la menciata elsendo, kun la titolo “Anti-Babel”, estis la multlingveco en la Eŭropa Unio, kaj interalie estis prezentata ankaŭ Esperanto. (dum 3 minutoj)

Antaŭ kelkaj monatoj la atenaj esperantistoj aranĝis publikan prezentadon de la konata esperantlingva libro “Vivi sur Barko” de P-ro Eugene de Zilah, kiu estis tradukita en la helenan de Manta Ĥristu, prezidanto de OSIEK. Okaze de tio, Kostas Kiriakos parolis detale pri Esperanto prezentante ankaŭ la nunan internacian esperantistan movadon. Ĵurnalistino de la ĉi-supra televizielsendo kiu ĉeestis, vidbendigis la tutan aranĝon kaj en ties fino petis

intervjuon de Kostas Kiriakos pri la tuta afero rilate al la lingvoj kaj al Esperanto dezirante ĝin prezenti en la programo pri la multlingveco de EU.

La elsendo pritraktis la nunan lingvan problemon, ĉar ĉiuj naciaj lingvoj de la ŝtatoj-membroj de EU estas laŭ la statuto oficialaj (ĝis nun 23), tiel, ke ĉiuj ĉiaspecaj diskutoj, prelegoj, dokumentoj k.a. devas esti tradukitaj kaj interpretitaj en ĉiuj lingvoj (506 kombinaĵoj). Respondeculo de la Eŭropa Unio substrekis ke, krom multaj problemoj (eraroj, miskomprenoj, malfruigoj k.a..) la multlingveco kostas miliardon da eŭroj ĉiujare (t.e. 2,2 eŭroj po eŭropano). Hispana eŭroparlamentano menciis ke 80 aŭ 90 % de la eŭropanoj ne scias nek uzas la anglan.



Kostas Kiriakos, krom la ordinaraj niaj potencaj argumentoj kiujn li analizis emfazante la neŭtralecon, kiu devas regi en EU, notis konklude ke kiel la Eŭropa Unio elpensis neŭtralan, internacian kaj komunan por ĉiuj flagon, kaj ĝi ne akceptis iun nacian, tiel same ĝi devas kaj

povas enkonduki en siaj ĉiaj laboroj neŭtralan, internacian, komunan lingvon, do la solan ekzistantan, dum 150 jarojn jam provitan Esperanton.

En la fino de la elsendo, ties prezentanto citis la rezulton de la lasta galopo de la kompanio "Eŭrobarometro", laŭ kiu duono de Eŭropanoj preferas unu komunan lingvon por tuta Eŭropo!

Kostas Kyriakos

ESPERANTO EN LA DEMANDO DE LA SEMAJNO ĈE TV5-Monde, FRANCIO



En novembro 2013 estis intervjuita la korsika EU-deputito Francois Alfonsi (Frakcio Verduloj/Regionalistoj) en TV5-Monde, franca televido. Alfonsi estas urbestro de Osani sur la insulo Korsiko - Jen koncize kion li diris:

"La korsika estas klare minacata lingvo. Mi vidas en Korsiko ke la juna generacio ne plu majstras la lingvon, kio necesas por transdoni ĝin al estontaj generacioj. ..."

Poste al la EP-deputito Alfonsi estis montrita la Demando de la Semajno, per ekrano prezentita de George Sossois, Valonia Esperanto-Asocio (Belgio) - kaj aktivulo de AVE:

"Spertoj kaj eksperimentoj montris ke meti Esperanton en la lernobjektojn de la baza lernejo kaj de la fremdaj lingvoj plibonigis la lernadon de la fremdaj lingvoj kaj ankaŭ la scipovojn de la patrina lingvo."

Kaj li demandis la Eŭropan parlamentanon: "Ĉu la Eŭropa Parlamento povas fari esploron pri la pedagogia utileco de Esperanto?"

Manfred Werstermayer

ILI DEZIRAS LERNI ESPERANTON, SED MANKAS INSTRUISTO

Mi konstante ripetas, ke valoras utiligi ĉiun eblon por informi pri Esperanto kaj por vigligi kunlaboron kun neesperantaj medioj. Jen ekzemplo indikanta, ke nia iafoje pena laboro ne estas sencela.

De aprilo ĝis majo ĉi-jare mi prelegis pri Esperanto utiligante la E-ekspozicion, kiu pasintjare estis prezentata en la Pola Senato. Mi turneis kun ĝi tra Malsupra Silezio disvastigante scion pri Esperanto. Ĉiam akompanis min Helena Biskup, kiu kortuŝe prezentis la monodramon *Doktoro Esperanto* de Mario Migliucci, poligitan de Roman Dobrzyński. Mi koncize priparolis la historion kaj ideon de Esperanto kaj la ekeston de la E-ekspozicio. Tiel ni vizitis la urbojn Wołów (dufoje), Wrocław kaj Złotoryja ĉiam vekante interesiĝon pri Esperanto kaj ĉiam ĉe plenaj ĉambregoj.



Novembre, do jam kelkajn monatojn post la prezentado de Esperanto, telefonis al mi sinjorino Krystyna Adaŝko, la direktorino de la Distrikta Centro de Edukado kaj Psikologi-Pedagogia Helpo en Wołów, denove invitante min kaj Helenan por prelegi pri Esperanto. La 10-an de decembro mi faris tie la prelegon "Esperanto — de malgranda lernolibro ĝis tutmonda movado" al bibliotekistoj kaj instruistoj de historio kaj de la pola lingvo. La prelego enhavis ankaŭ mini-lecionon de Esperanto, por montri ĝian facilecon. Post la prelego la ĉeestantoj diris, ke mi havis vere malfacilan taskon prezenti „sekajn faktojn”,

sed ke mi faris tion tiel fervore kaj atentokapte, ke neniu dum la 40 minutoj enuis. Helena Biskup kiel kutime belege i kortuŝe prezentis la monodramon *Doktoro Esperanto*, vekante aplaŭdon de la publiko. Ĉiuj aŭskultantoj konstatis, ke ankoraŭ neniam ili renkontis personojn tiel ŝargitajn per pozitiva energio kiel mi kaj Helena kaj ke post la renkontiĝo kun ni neniu povas ne lerni Esperanton. Kaj efektive, la tuta publiko decidis komenci lerni nian lingvon!

Tio estas ege pozitiva flanko de nia pena laboro, sed estas ankaŭ alia flanko, malpli pozitiva: mankas E-instruistoj. La plej proksima al Wołów kurso de Esperanto okazas en Wrocław, do tro malproksime por la loĝantoj de Wołów. La sama situacio havis lokon en Złotoryja, kie, post nia prezentado en junio, ariĝis grupo da personoj emaj lerni Esperanton, sed pro manko de instruisto nenia kurso okazis.

Prof. Ilona Koutny, la gvidantino de la trijaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj ĉe la Poznana Universitato Adam Mickiewicz, ĉiujare baraktas kontraŭ manko de studentoj. Ŝi eĉ havas problemojn varbi studentojn por unujara instruista trejnado, kvankam la studado kaj la trejnado kadre de la interlingvistikaj studoj estas perfekte preparitaj, kaj prelegas en ili alte kvalifikitaj lekciistoj.

En ĉi tiu situacio aperas demando: ĉu indas klopodi popularigi Esperanton kaj aktivigi kunlaboron kun la neesperanta medio, se ni ne povas forĝi nian penadon en plenan sukceson? Sendube vekado de interesiĝo pri Esperanto inter lernejoj instruistoj estas tre sencohava agado, ĉar ilia interesiĝo helpas ekinteresi pri la internacia lingvo ankaŭ iliajn lernantojn. Sed kio okazu poste? Direkti la interesiĝintojn al interretaj kursoj ne ĉiam estas bona solvo. Nun ni devas strebi al profesiigo de E-instruado. Ni ne rajtas bagateligi la problemon de manko de bone edukitaj kaj diplomitaj instruistoj. Ni ankaŭ ne povas akcepti la fakton, ke Esperanto estas instruata de entuziasmuloj, kiuj ne nur ricevas pro tio neniam financajn rimedojn, sed plej ofte instruas per sia propra mono kaj je la kosto de sia familia vivo.

La Esperantaj organizaĵoj, precipe tiuj plej gravaj, devas peni solvi tiun ĉi gravan problemon. Por la estraro de la Centro de Interkultura Edukado - Regiona Buroo Vroclavo

Małgosia Komarnicka



EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN VALENCIO

Inter la 9-a kaj 13-a decembro oni montris en Valencio la itineran ekspozicion pri Esperanto de CGT (Federacio de Valenciaj Sindikatoj). Ĝi okazis en la ejo " Octubre Centre de Cultura Contemporània" (C/ Sant Ferran/San Fernando, 12).

Ene de la paĝo <http://www.cgtvalencia.org/2013/11/del-9-al-13-de-deseembre-2013-exposicio.html> spekteblas video pri la ekspozicio (rekte per http://youtu.be/L3mr_g8zYLc).

Dario Rodriguez

81-A ITALA KONGRESO EN AŬGUSTO 1014 - ADAPTIĜAS ANKAŬ POR LA JUNULARO

En Fai della Paganella [Fajdelapaganelo], sur la montaro Dolomitoj, en la itala provinco Trento ĉio estas preta por akcepti ankaŭ multajn junajn esperantistojn okaze de la 81-a Itala Kongreso de Esperanto de la 23-a ĝis la 30-a de aŭgusto 2014. Ekzistas junulara programo, kiu okupiĝas pli pri la noktoj ol pri la tagoj. Ĉiuokaze, se iu estas veka ankaŭ frumatene, li aŭ ŝi rajtas plonĝi en la kulturan programon (seminarioj, prelegoj kaj tiel plu). Aliokaze sufiĉas

komenci per la ĉiuvespera koncerto aŭ spektaklo kaj daŭrigi per la noktaj meditadoj, kiuj komenciĝas ne pli frue ol noktomeze.

Ĉi tio kaj la interkonsento kun pluraj lokaj picejoj por tre malmultekostaj manĝoj estas preter ĉia konkurenco. Iru al la paĝaro <http://kongreso.esperanto.it/81/> kaj aliĝu.

La Kongresa Komitato

EŬROPA KLUBO 1974 – 2006

Eŭropa Klubo - la Societo pri lingvlimtranspaŝa eŭropa interkompreniĝo r.a. estis fondita la 15an de novembro 1974 en Paderborn. Celo de la societo estis kontribui al la starigo de libera Eŭropo de samrajtaj nacioj, konservante ilian lingvan kaj kulturalan heredaĵon.

Kiel sukcesoj de Eŭropa Klubo menciindas:



- sur la kampo de la interna konstruo la fakto, ke la Eŭropa Klubo post sia fondiĝo en Paderborn dum duonjardeko trovis kelkcent membrojn en ĉiuj siatempaj EK-landoj, en pluraj aliaj eŭropaj landoj kaj inter amikoj de Eŭropo en aliaj kontinentoj,
- sur la kampo de la agado eksteren la faktoj, ke la Eŭropa Klubo plueldonadis por siaj membroj la revuon „eŭropa dokumentaro“, komence kunlabore kun la ĝin iniciatinta Centro por Eŭropa Klerigado, kaj ke ĝi per la unuafoje

1977 aperinta Eŭropa Kalendaro, kiun ricevadis ĉiuj membroj, kiel ekzemplo por la samranga pritrakteblo de la lingvoj de ĉiuj EK-landoj (kunuzante la Latinan kaj Esperanton kiel neŭtralajn lingvojn), estis atentata de lingvopedagogoj kaj de eŭropaj politikistoj,

- sur la kampo de scienco la faktoj, ke la Eŭropa Klubo, kunlabore kun la tiam FEO LL-Instituto pri Kibernetika Pedagogio kaj kun GPI (komence „Societo pri programita instruado“, poste „... pri pedagogio kaj informado“), eldonis eŭropan libroserion „Sennaciigita Scienco“, al kiu apartenas ankaŭ „EK-vortaro de matematikaj nocioj“ (uzanta strikte samrange ĉiujn lingvojn oficialaj en la tiamaj EK-landoj kaj Esperanton kiel neŭtralan referenclingvon), ke la Eŭropa Klubo en la jaro 1976 organizis en la kroata Primošten Internaciajn Somerajn Universitatajn Semajnojn en la lingvoj germana, angla, franca, itala kaj kroata samkiel en Esperanto, Ido kaj Interlingua. Tio iĝis modelo por la fondo kaj laboro de AIS San Marino. En 1980 Eŭropa Klubo okazigis en Namur (Belgio) kune kun la „Association Internationale de Cybernétique“ enkadre de ties IX-a Internacia Kibernetika Kongreso simpozion pri lingvokibernetiko kaj interlingvistiko, pro kio Esperanto krom la franca kaj la angla lingvoj iĝis ties laborlingvo,
- sur la kampo de klerigado la faktoj, ke la Eŭropa Klubo fondiĝis kiel jura portanto de lerneja eksperimento, klergiscience prizorgata de la landa esplorcentro FEO LL (Esplor-kaj Evoluigcentro por enobjektigitaj Metodoj de la Instruado kaj Lernado), nome de la „lingvo-orientiga instruado“ (propedeŭtiko por fremdlingvo-instruado en bazaj lernejoj, kiu poste oficialiĝis en Italio), kaj evoluigis kriteriojn por la lingvokompren-ekzameno, kiujn ĝi aplikis en la finekzamenoj de intensaj kursoj,

- sur la kampo de politiko la faktoj, ke la Eŭropa Klubo kunorganizis en 1979 en la Eŭropa Akademio Otzenhausen kolokvon pri la eŭropa linvopolitiko, dum kiu diverse orientitaj politikistoj unuafoje diskutis tiun tabuan problemkampon ankaŭ rilate al realisma neŭtrala solvo (la Latina, planlingvoj) kaj ke la registaro de de la Respubliko de San Marino la 19-an de majo 1985 decidis la fondon de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino laŭ propono de la scienckonsilantaro de Eŭropa Klubo.



La Eŭropa Klubo esperis akiri novajn sukcesojn en sia tria jardeko, se ĝi koncentriĝos al la problemoj, kiujn la eŭropaj politikistoj ignoras aŭ neglektas pro tio, ke tiaj problemoj estas decidigaj ne por la estontaj elektoj, sed por estontaj generacioj. Konforma celperspektivo devis esti ellaborata, publike diskutata kaj alstrebata per unuopaj agoj. Oni strebis plilarĝigi membraran bazon je pluaj grupoj da interesitoj. Dum la reaktivo de Eŭropa Klubo oni serĉis konstruivajn solvojn en eŭropaj problemdimensioj. Ili estis propagandataj en la publika diskuto, praktike aplikataj dum aligado de novaj membroj kaj dum projektlaboro. El la interna diskuto rezultis la jenaj problempunktoj:

- Celi neniun ellimigon de ajna lando apartenanta al la eŭropa kontinento, kiu estas liberema ankaŭ rilate al siaj etnaj minoritatoj; sed aliflanke ne voli „alligon“ de granda azia teritorio malantaŭ la Uralo. Konkrete: la Eŭropa Unio devas malfermiĝi al la aliĝo de ĉiuj reformeŭropaj landoj, kiuj situas komplete en Eŭropo. Malfermiĝo ankaŭ al Turkio estas nepensebla antaŭ ol la tieaj minoritatoj estos akirintaj la rajton pri memdetermino. La rusa teritorio situas plej grandparte malantaŭ la Uralo kaj konstituas (ev. kun la aliaj landoj de la komunumo de sendependaj ŝtatoj) apartan regionon, multe tro grandan por integriĝo en EU.
- Ne voli la Eŭropan Union kiel enmigran landon, sed tamen pledi (krom por la havigo de azilrajto por petantoj, kiuj estas pro siaj religia, politika aŭ alia mondkoncepta konvinko persekutataj en sia hejmlando) por la malfermiĝo ankaŭ al „elekteŭropanoj“. La kondiĉo plenumenda en unuopaj kazoj devus esti, ke ĉi tiuj volas kaj povas kontribui al la plukonstruado de libera Eŭropo de samrajtaj popoloj konservanta ties lingvan kaj kulturen heredaĵon per tio, ke ili aktive kaj modele klopodas pri neŭtrala, komuna eŭropa komunikadlingvo. Konkrete: la enmigrintoj antaŭe kapablu komuniki en la Latina, Esperanto aŭ en alia neutrala lingvo eventuale taŭga por fariĝi la komuna dua lingvo de la Eŭropa Unio.



Eŭropa Klubo ne limigis sian membrovarbadon al la Esperanto-movado. Ĝi atentigadis al la Latina kiel alternativa realisma solvo de eŭropa komunikadproblemo, kaj, aldone, serioze konsideris krom Esperanto aliajn klopodojn pri interlingvistikaj planlingvoj. Tio montriĝis ankaŭ en la konsisto de ĝia estraro. En sia lingvopolitika celperspektivo estis unuaranga la eltrovo de neŭtrala solvo antaŭ la propagado de unu certa el la penseblaj neŭtralaj eŭropaj

duaj lingvoj. Serioze rigardataj estis ankaŭ realigeblaj kompromisproponoj, kiuj preparis la planlingvan solvon por la estonteco, sed pledis tamen por la tuja enkonduko de latinaj nomoj por eŭropaj institucioj aŭ de latinaj enskriboj ene de ili tie, kie estus malavantaĝa apudstarigo de ĉiuj eŭropaj lingvoj. Privilegiita pozicio de tiu aŭ alia eŭropa nacia lingvo

„pro pragmatikaj kialoj“ estus legitima nur sub la kondiĉo, ke ĝi estas sendube nur transira solvo kaj ke temas pri tipe eŭropa lingvo. Tiaj estas inter la lingvoj „grandaj“ laŭ la nombro da eŭropaj parolantoj nur la Germana, la Itala kaj ankaŭ la Franca. La Angla, la Hispana kaj la Portugala estas parolataj plej grandparte en aliaj kontinentoj, ili do ne estas tipaj por Eŭropo; ilia eĉ nur transire preferata uzo kiel laborlingvoj de eŭropaj institucioj kaj kunlaboro tial ne povus kontribui al la evoluo de sentemo pri eŭropa identeco. Ĉi tiuj prikonsideroj publikiĝis interalie en la dulingva artikolo „La Eŭropa Klubo: Ki ĝi estis? Kio ekestu el ĝi? Invito partopreni en la baza diskuto kaj la plulaborado“, en Eŭropa Kalendaro 1999-2000, p. 93-99.

La Eŭropa Klubo alvokis al publika diskutado de kernpostuloj kaj konkretigoj de eŭropa lingvopolitiko kaj invitis al membriĝo kaj kunlaboro ĉiun, kiu ĉirilate subtenis la principon de libera Eŭropon de samrajtaj nacioj konservante ilian lingvan kaj kulturen heredaĵon. La rezulto de tiu ĉi aktiveco estis la „Deklaracio de Kiel“, kiu publikiĝis en grkg/H 2004/45/1. En 2006 proponis la Eŭropa Klubo agadon de „Eŭropa Lingvo- kaj Kulturparlamento“, kunlabore kun la Societo por germana lingvo (VDS), AIS San Marino kaj studentoj de Universitato Paderborn. La parlamento devis koncentriĝi ĉefe al lingvopolitiko, pritrakti preskribojn por lingvaj instruadoj, minimumajn postulojn plenumendajn de eŭropaj ŝtatoj rilate al la strukturigo de ties klerigistemoj, kaj lanĉi difinon de eŭrologiaj instruadoj. La ĉefiniciatinto de tiuj ĉi aktivecoj estis Prof. Helmar Frank. Post lia subita malsaniĝo en somero 2007 oni ne plu aktivis kaj post du jaroj de pasiveco estis la Eŭropa Klubo en majo 2009 likvidita. Almenaŭ ene de Esperanto-movado plu aktivas organizaĵoj kun similaj celoj.

Helmar Frank

BIOGRAFIO

HELMAR GUNTER FRANK (19.2.1933 – 15.12.2013)



Frank studis matematikon, fizikon kaj filozofion en Stuttgart, Tübingen kaj Parizo, doktoriĝis pri filozofio kaj habilitiĝis pri kibernetika pedagogio. 1963, tridekjaraĝa, li iĝis profesoro de la Pedagogia Altlernejo en Berlino kaj fondis tie Kibernetikan Instituton, kie, kun subteno de Konrad Zuse (inventinto de komputilo), konstruiĝis instruaŭtomatoj. En 1970, pro kunlaboro kun Heinz Nixdorf, siatempe unu el mondgrandaj produktantoj de komputiloj, Frank transiris al Paderborn por gvidi esplorcentron pri objektigita instruado. Tiu poste enkorpiĝis en la Universitaton Paderborn, kiun Frank kunfondis. Li estris tiean Klerigkibernetikan Instituton kiel orda profesoro ekde 1972 ĝis sia malsaniĝo en 2006. Ekde tiam ĝis la forpaso li vivis en flegejo.

Frank apartenas al pioniraj komunikadkibernetikaj sciencistoj, li lanĉis kibernetikan informaci-psikologion kaj klerigkibernetikon, kunfondis informaci-estetikon kaj lingvokibernetikon. Li estas honora profesoro de universitatoj en Berlino, Klagenfurt, Linz, Prago, Nitra, Sibiu, Moskvo, São Paŭlo, San Salvador, Buenos Aires, Rosario kaj Guangzhou, honorprezidanto de pluraj germanaj kaj internaciaj fakaj organizaĵoj, aŭtoro de kelkcent sciencaj artikoloj kaj libroj.

Li ricevis plurajn internaciajn honorigojn kaj la unuaklasan meritkrucon de la Federacia

Respubliko Germanio. Krome li politike aktivis: kiel membro de germana liberalisma partio (FDP) li dufoje kandidatiĝis por Eŭropa Parlamento.

Esperanton li ellernis en Paderborn, kie estis “Esperanto-Centro” kun granda librejo de Hermann Behrmann. Frank aprezis lernfacilecon kaj “algoritmecon” de la lingvo, kiun li opiniis taŭga propedeŭtiko por instruado de fremdlingvoj anstataŭ plifruigo de la instruado de la Angla. Konatiĝinte kun István Szerdahelyi, li informiĝis pri Esperantaj propedeŭtikaj eksperimentoj kaj mem organizis 1975-1984 por sescent infanoj “Lingvoorientigan instruadon”, kies pozitivajn rezultojn li mezuris per propraj klerigkibernetikaj metodoj. Propagado de Esperanto kiel unua fremdlingvo en Eŭropo iĝis parto de lingvopolitika laboro de Frank, precipe en “Eŭropa Klubo” (1974-2009), kiun li kunfondis kun la celo kontribui al lingva samrajteco de Eŭropo, kaj en politika liberalisma klubo “ALEUS”, aprezanta la neŭtralecon de la internacia lingvo. Pro iniciato de Frank iĝis Esperanto ankaŭ unu de la laborlingvoj de "Association Internationale de Cybernétique" (AIC) kaj unu el la publikaĵlingvoj de la revuo « grkg/Humankybernetik ».

La ideon de neŭtrala kaj facila internacia lingvo por sciencistoj sekvis Frank kiel iniciatinto kaj prezidinto (1983-2007) de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). Ĝi promocias esploradon kaj kleriĝon en ĉiuj sciencaj kampoj kaj ebligas vastan internacian kunlaboron ĉu de unuopaj sciencistoj, ĉu de universitatoj, uzante, laŭstatute, kiel laborlingvon la Internacian Lingvon (ILO). Kiel tia rolas Esperanto, sendube la plej granda neŭtrala internacia lingvo. En Esperanto okazas instruado dum AIS-studadsesioj kaj en AIS-klerigejoj, en paralelaj naciligva kaj Esperanta versioj estas skribataj diplomlaboraĵoj kaj sciencaj verkoj de akademianoj, en Esperanto publikiĝas “Acta Sanmarinensia”.

Frank partoprenis, krom en 2004, en ĉiuj UK de UEA inter 1974 – 2006, multfoje kiel preleganto. 1990 li prezidis la Internacian Kongresan Universitaton en Kubo. En 2004 li estis elektita "Esperantisto de la Jaro". Ankaŭ liaj familianoj estas aktivaj esperantistoj, lia filino Michaela estas E-denaskulino.

kp.: http://eo.wikipedia.org/wiki/Helmar_Frank

Vera Barandowska – Frank

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de decembro 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljarić

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, estraro de EEU, Kostas Kyriakos, Manfred Werstermayer, Malgosia Komarnicka, Dario Rodriguez, Vera Barandowska kaj Helmar Frank (postmorte).

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

